

De marto 2020a ĝis majo 2021a, la sinsekvaj hejmo-trudoj pro la koronavirusa pandemio disponigis sufiĉe da tempo por retrovi, relegi, klasi kaj kompili tekstojn (ĉu majoritate tradukaĵojn, ĉu originalaĵojn) kiuj amasiĝis laŭlonge de la ĝisnunaj jaroj (proks. 25 jarojn). Laŭ mia memoro, la fasonado de kelkaj necesigis nur kelkajn minutojn, de aliaj horcentojn. Ili ĉiuj estas la frukto de mia tiama entuziasmo por Esperanto, eĉ se kelkaj el la unuaj (ekz. « Ek al l' laboraĉo ») evidencigas neniun atenton pri la plej elementa rimofara tekniko. Tamen eĉ ĉi poemaĵon mi konservis ĉar amuzis min ke la diletanteco de Gaston same ampleksis kiel mia tiama diletanteco rilate Esperanton.

Sinsekvaj tradukoj de poemoj (aŭ de kanzonoj sen respekto de la takto), de kanzonoj (ĉifoje pli-malpli kun enkalkulo de la takto), de prozo, de artikoloj kaj fine nemultaj originalaĵoj aŭ ambaŭlingvaĵoj. Enestas neniuj tekstoj jam publikigitaj aŭ en miaj propraj eldonaĵoj (escepte de kelkaj tradukoj aŭ adaptoj de poemoj), aŭ KromKancerKlinike (Hägar Dunor, noveloj de Asimov), aŭ en Ajnoteko (<http://ajnoteko.unblog.fr/>) al kies trarigardo mi cetere invitas vin.

Koncerne kun Gaston Lagaffe, mi ne povas skani la tutan albumon n°14, kiun mi tradukis en 1994. Scivolemuloj alvoku min.

La deziro fari ion estas foje nesufiĉa por efektiviĝi tion celatan. Tiel du tekstojn mi havis la firman intencon traduki : « Les moulins de mon cœur » kunverkita de Marilyn kaj Alan Bergman kaj tradukita (franclingven) de Michel Legrand, kaj « La rose et le réséda » de Louis Aragon. Miajn kelkajn provojn kiujn mi retrovis pri la unua mi forĵetis kaj mi eĉ dubetas pri ĝia tradukeblo en Esperanton. Se iu iam sukcesos, tiun mi varme gratulos. El la dua mi retrovis nur tri strofojn (ja krude tradukitajn) kiujn mi konservis ĉiposte. Same, se iu deziras repreni la defion...

Anstataŭ forĵeti (kiel mi nelge faris pri parto de miaj nevenditaj libroj) aŭ lasi tiujn paĝojn en ublieto, mi decidis disdonaci ilin al la kelkiuj kiujn mi havis la plezuron renkonti dum tiu nun pasinta tempo.

Evidente la senprofita reuzo (ekz. en kursoj), dissendo (ĉu papere ĉu rete) estas entute libera private kaj asocie. La facile modifeblan (Word-an) datumaron mi povos disponigi post simpla mesaĝ-peto. Eventuala modifanto (pliboniganto) de teksto bonvolu subskribi siajn modifojn.

Bonan legadon.

la 3an de junio 2021a (reviziita kaj kompletigita la 14an de junio 2022a)

C. Rivière

Traduko de poemoj (kelkaj estis kanzonoj en la franca) (paĝon 3)

La mi-forma parolado / Le discours à la 3^{ème} personne (Louis Aragon)
Elsa eniras la poemon / Elsa entre dans le poème (Louis Aragon)
La Rozo kaj la rezedo (fragmento) / La rose et le réséda (fragment) (Louis Aragon)
Kara mia (dialogo inter George Sand kaj Alfred de Musset per rompitaĵaj versoj kaj akrostikoj)
La loketo (akrostiko) / Le petit endroit (Alfred de Musset aŭ Maurice Sand)
Gamo (akrostiko inspirita de Guido d'Arezzo)
Tra l' aero (memorigilo pri la decimaloj de π)
Rideto / Un sourire (Raoul Follereau)
Defendi la ĝojon / Defensa de la alegría (Mario Benedetti)
Kio okazus... ? / ¿Qué pasaría...? (Mario Benedetti)
La stria fuŝ' / Le ciel en otage (Nicole Lançon)
La soldato de Marsala / Le soldat de Marsala (Gustave Nadaud)
Mia lasta vojaĝo / Mon dernier voyage (Alain Pizerra)
De kie mi estas ? / D'où je suis ? (Alain Pizerra)
Io ploras en mia kor' / Il pleure dans mon cœur (Paul Verlaine)

Traduko de kanzonoj (kun respekto de la takto) (paĝon 17)

Eble sufiĉus / Il n'aurait fallu (Louis Aragon)
La ruĝa afiŝo / L'affiche rouge (Louis Aragon)
Ni ne plu mortigu / Il ne faut plus tuer (Glenmor)
Ekstere ĉio floras / Dehors tout reflurit (Delphine Coutant)
Por plu aperi supre de l' afiŝo / Pour être encore en haut de l'affiche (Jean Ferrat)
Naissance / Naskiĝo (Danielle Messia)
La lavendo / La lavande (Claire Pommet)
Multnombraj / Nombreux (Angèle Van Laeken)
Reĝino via / Ta reine (Angèle Van Laeken)

Traduko de prozo (paĝon 26)

Ellaborado de produktaĵoj / Elaboración de productos (Juan José Millás)

Traduko de artikoloj (paĝon 27)

Galantoj / Perce-neige (François Taillandier)
Instrui globiŝe / Enseigner en globish (François Taillandier)
Kial tia malamo kontraŭ Charles Enderlin ? / Pourquoi une telle haine contre Charles Enderlin ?
(Claude Baudry) plus la samtema « Keglo-ludo »

Diversaĵoj (paĝon 32)

Ek al l' laboraĉo
Kafotasoj

La mi-forma parolado
(3^a parto)

Pasantoj vojon de l' vivo laŭas
Mondo apuda resonas en mi
Ol mian koron ĝin aŭdas eĉ pli
Ĉi mondo lamas kor' mia lacas

Mankis aŭdaco mankis kuraĝo
Idlas la mondo, nenion ŝanĝas
Pri ĉi danĝero ni adaptiĝas
Nenio novas malgraŭ la aĝo

Pri kio maje ni emis revĵ ?
De proksimuloj mildigi zorgojn
Nu enkalkulu kosten eĉ vortojn
Tempo perdita indas alvivi

Ĉies vizaĝoj ties vizaĝo
Da malfeliĉaj mi tiom vidis
Sed mi por ili kion decidis
Nur malŝpariĝis mia kuraĝo

Krome kantis kantadis kant-ardis
Por ke ĉi ombro fariĝu homo
Kiel dimanĉo en nia domo
Kvazaŭ esperon vero sin farbis

Da ili tiom vidis forfuĝi
Bezonis tiuj nur cigaredon
Ne ribelis nek montris koleron
En senecon kapablis rifuĝi

Aŭdas mi ties voĉon kaj paŝon
Kiu parolas daŭre banale
Kiel vespere hejme babile
Kiel raporto plenigas paĝon

Kio do pri vi gekamaradoj,
Roko tenera tro frue splita
Aspektas ŝtono vi eluzita
Vin rigardi korŝiras al larmoj

Ĉio siamomentas ĉimonde
De temp' al tempo ĉi Tero tremas
Aflikto same aflikton semas
Same profunde same profunde

Vi volus kredi je ĉiel-bluo
Ankaŭ mi konas tiun ĉi senton
Eĉ foje tion kredas momenton
Kvazaŭ alaŭdo antaŭ spegulo

Le discours à la première personne
(3^{ème} partie)

J'entends j'entends le monde est là
Il passe des gens sur la route
Plus que mon coeur je les écoute
Le monde est mal fait mon coeur las

Faute de vaillance ou d'audace
Tout va son train rien n'a changé
On s'arrange avec le danger
L'âge vient sans que rien se passe

Au printemps de quoi rêvais-tu
On prend la main de qui l'on croise
Ah mettez les mots sur l'ardoise
Compte qui peut le temps perdu

Tous ces visages ces visages
J'en ai tant vu des malheureux
Et qu'est ce que j'ai fait pour eux
Sinon gaspiller mon courage

Sinon chanter chanter chanter
Pour que l'ombre se fasse humaine
Comme un dimanche à la semaine
Et l'espoir à la vérité

J'en ai tant vu qui s'en allèrent
Ils ne demandaient que du feu
Ils se contentaient de si peu
Ils avaient si peu de colère

J'entends leurs pas j'entends leurs voix
Qui disent des choses banales
Comme on en lit sur le journal
Comme on en dit le soir chez soi

Ce qu'on fait de vous hommes femmes
Ô pierre tendre tôt usée
Et vos apparences brisées
Vous regarder m'arrache l'âme

Les choses vont comme elles vont
De temps en temps la terre tremble
Le malheur au malheur ressemble
Il est profond profond profond

Vous voudriez au ciel bleu croire
Je le connais ce sentiment
J'y crois aussi moi par moments
Comme l'alouette au miroir

Fojfoje ankaŭ mi kredas tion
Eĉ nekredeblas al mia menso
Nu ja samas mi al via penso
Nu mi videble similas vion

Similas ambaŭ kiel sableroj
Samkiel sango daŭre abunde
Kiel doloras fingroj sam-vunde
Nu samas ankaŭ niaj koleroj

Mi tiom arde vin helpi volis
Vi aliaj "mi", sed al mi samas
Tamen ĉi vortojn kiujn mi semas
Ĝis vi portoti ĉu vento povis ?

Ĉio glitas nenio vin tuŝas
Nek miaj manoj nek miaj paĝoj
Laŭvagas voje plu viaj paŝoj
Sed ne scias kion mi perbuŝas

Infero via plurestas mia
Daŭre ni vivas sub sama rego
Ambaŭ suferas pro sama jugo
Dum mi sangas, fluas sango via

Tiomhoras nun, tiavetere
Mi por vi gajni dezirus tiom
Se perdi riskas eĉ mian ĉion
Eble utilos tiel surtere

Revo modesta sed iluzia
Prefere indus prie silenti
Ĝis tombo devos mi ĝin pripensi
Kvazaŭ pri stelo ĉi eluzita

reviziita de Georges Lagrange

J'y crois parfois je vous l'avoue
A n'en pas croire mes oreilles
Ah je suis bien votre pareil
Ah je suis bien pareil à vous

A vous comme les grains de sable
Comme le sang toujours versé
Comme les doigts toujours blessés
Ah je suis bien votre semblable

J'aurais tant voulu vous aider
Vous qui semblez autres moi-même
Mais les mots qu'au vent noir je sème
Qui sait si vous les entendez

Tout se perd et rien ne vous touche
Ni mes paroles ni mes mains
Et vous passez votre chemin
Sans savoir ce que dit ma bouche

Votre enfer est pourtant le mien
Nous vivons sous le même règne
Et lorsque vous saignez je saigne
Et je meurs dans vos mêmes liens

Quelle heure est-il quel temps fait-il
J'aurais tant aimé cependant
Gagner pour vous pour moi perdant
Avoir été peut-être utile

C'est un rêve modeste et fou
Il aurait mieux valu le taire
Vous me mettez avec en terre
Comme une étoile au fond d'un trou

Louis Aragon (1960)

Noto : La dek du lastaj strofoj estis kantitaj de Jean Ferrat
(« J'entends j'entends ») :

<https://www.youtube.com/watch?v=LIdugoXauNc>

Elsa eniras la poemon (2^a parto)

Je sepa horo kaj dek, jam tizano malvarmas
Taso menton odoras ĉe la leda horloĝo
Mi solas en mateno kies cindro ekdormas
Blankiĝas nekapabla forgesi pri la braĝo

Mi laŭtvoĉe parolas lingvon riman de versoj
Kvazaŭ nepre volus min al stato prove toksa
De kie venas emo al ĉi vantaj perversoj
De kie vortaj bidoj de mia verko teksa

Al tiu ludo vorta, kiu do ĝu-sopiras
Kiu stagna plezuro, moroza monotono
Ja min mi aŭdas, min interrompas, kaj mi miras
De mia menso-fingro jam kolapsas neŭrono

Jen denova rutino en matena krepusko
Mi nur la tempon atendas en ĉambro rifuĝa
La tempo paŭzas en mi kvazaŭ sango en striko
Kaj por mi fariĝas mi nur ĉi vorto forfuĝa

*Ha lo
Ej vi Mi tuj alvenos*

Elsa entre dans le poème (2^{ème} partie)

Il est sept heures dix une tasse de menthe
A côté de la pendule en cuir refroidit
Je suis seul au matin dont les cendres dormantes
Blanchissent sans pouvoir oublier l'incendie

Je parle à haute voix le langage des vers
Comme si je faisais l'essai de ma folie
D'où me vient-il ce goût puéril et pervers
D'où me viennent les mots que je lie et délie

Qu'est-ce que ce plaisir morose et monotone
Ce passe-temps verbal et qui donc s'y complâit
C'est bien moi je m'entends m'interromps et m'étonne
Et de mes doigts mentaux tombent les osselets

C'est un jour machinal aujourd'hui qui se lève
Je n'attends que le temps dans la chambre où je suis
Le temps s'arrête en moi comme un sang qui fait grève
Et je deviens pour moi comme un mot qui me fuit

*Allô
C'est toi J'arrive*

Louis Aragon (1960)

La Rozo kaj la rezedo

Tiu kredis je la ĉiel'
Tiu l' eterna sendian'

Se tritikojn draŝas la hajl'
Stultas postul' de bagatel'
En sino de kuna batal'
Stultas emo pri la kverel'

Ĉi tie sur la citadel'
De gvatejo kraĉis mitral'
La unuan trafis la cel'
La alia mortis en fal'

En putro de karcera ĉel'
Kies aĉas la lita pajl'
Kiu suferas pro la gel'
Por kiu manĝindas la rat'

La rose et le réséda

Celui qui croyait au ciel
Celui qui n'y croyait pas
...

Quand les blés sont sous la grêle
Fou qui fait le délicat
Fou qui songe à ses querelles
Au coeur du commun combat
...

Du haut de la citadelle
La sentinelle tira
Par deux fois et l'un chancelle
L'autre tombe qui mourra
...

Ils sont en prison Lequel
A le plus triste grabat
Lequel plus que l'autre gèle
Lequel préfère les rats
...

Varianto

Se tritikon draŝas hajlo
Stultas postul' bagatela
En komuna kun-batalo
Stultas emo dis-kverela

El supro de citadelo
Kraĉis de gvatej' mitralo
Trafis l' unuan la celo
Mortis l' alia en falo

En putro de karcer-ĉelo
Kies litaĉas la pajlo
Kiu suferas pro gelo
Por kiu indas la rato

Kara mia,

Mi estas tute emociita ĉar mi ja sentis antaŭ kelkaj tagoj, ke vi **daŭre ĝisfreneze aspiras al kundanco.** Ke tio komenciĝu kun **efiko kaj mi ja celas : tio estu** pruvo ke eblos ĝui estontan vivon **kun vi. Mi pretas montri mian puran** koron same kiel ĝian **virgon, kaj se vi volas tiel vidi min** senvualigi al vi mian animon **tute nuda, bonvolu viziti min,** ni amike diskutos, rekte, senkaŝe, **mi pruvos al vi ke mi estas virino** sincera, kapabla montri pri amo **la plej profunda, ankaŭ la plej sekreta** inklino, do ino la plej korszensiva **kiun vi konas. Ĉar via peniga** vivo liberas, pensu ke mia **menso estas ja preta, vigla kaj cetere** tenera. Mia ĉagreno estas tro **granda. Alkuru urĝe por ĝin al mi** forgesigi. Al vi mi volas min **submeti entute.**

George Sand al Alfred de Musset

Kiam mi prezentas al vi tian eternan omaĝon,
Vi permesu ke foje mi montru alian vizaĝon.
Volas vi kapti la sincerajn sentojn de koro mia.
Ke tiu ĉi batadu por vi volis ja cerbo Dia.
Mi amas vin, kara, kaj mia menso emas deliri.
Kuŝu papere tio kion mi ne aŭdacas diri.
Kun atento el miaj versoj legu unuajn vortojn :
Vi scios kiel plej efike forflegi miajn zorgojn.
?

Alfred de Musset

Ĉi tiun proponon via koro sendas ja pro amo
Nokton gean vi aspiras, sed nocas al mia famo

George Sand

Cher ami,

Je suis très émue de vous dire que j'ai bien compris l'autre soir que vous aviez **toujours une envie folle de me faire** danser. Je garde le souvenir de votre **baiser et je voudrais bien que ce soit** là une preuve que je puisse être aimée **par vous. Je suis prête à vous montrer mon** affection toute désintéressée et sans **calcul, et si vous voulez me voir aussi** vous dévoiler sans artifice mon âme **toute nue, venez me faire une visite.** Nous causerons en amis, franchement. **Je vous prouverai que je suis la femme** sincère, capable de vous offrir l'affection **la plus profonde comme la plus étroite** amitié, en un mot la meilleure preuve **que vous puissiez rêver, puisque votre** âme est libre. Pensez que la solitude où j'**habite est bien longue, bien dure et souvent** difficile. Ainsi en y songeant j'ai l'**âme grosse. Accourez donc vite et venez me la** faire oublier par l'amour où je veux me **mettre.**

Quand je vous jure, hélas! un éternel hommage
Voulez-vous qu'un instant je change de langage ?
Vous seule possédez mon esprit et mon cœur.
Que ne puis-je pas avec vous goûter le vrai bonheur !
Je vous aime, ma belle, et ma plume en délire
Couche sur le papier ce que je n'ose dire
Avec soin, de mes vers, lisez les premiers mots,
Vous saurez quel remède apporter à mes maux.

Alfred de Musset

Cette grande faveur que votre ardeur réclame
Nuit peut-être à l'honneur, mais répond à ma flamme...

George Sand

La loketo

Nu vi kiu, en humila pozo, ĉi tien alvenis,
El viaj balastitaj flankoj ion troan demetis,
Certe vi scias ke, post ĉi tiu natura delaso,
Elŝutado en urnon de iu modesta donaco,
Sitele vi verŝu en *amforon*, purondan flueton.
Eĉ ke, super la fumanta *altaro*, kvazaŭ ĉapelon,
Junte reloku vi l' ovalan kovrilon, kio trafe
Odrojn elŝteliĝontajn neniigos nazdomaĝe.

Le petit endroit

Vous qui venez ici dans une humble posture,
Débarrasser vos flancs d'un importun fardeau,
Veuillez, quand vous aurez soulagé la nature
Et déposé dans l'urne un modeste cadeau,
Épancher dans l'amphore un courant d'onde pure,
Puis, sur l'autel fumant, placer pour chapiteau
Le couvercle arrondi dont l'auguste jointure
Aux parfums indiscrets doit servir de tombeau.

Alfred de Musset aŭ Maurice Sand

Gamo

UTile ŝtuparas tiu vico de notoj,
REgule semitaj kvazaŭ koboldaj botoj.
MInoras aŭ maĵoras gamoj el l' difino.
FAcile ludiĝos muzikoj en rafino.
SOLfeĝon oni lernu, vagadu laŭgame,
LAme-stumble unue, poste flue-flame.
SInjoron d'Arezzo ni sepfoje gratulas.

UT queant laxis,
REsonare fibris,
Mira gestorum,
FAmuli tuorum,
SOLve polluti,
LAbii reatum,
Sancte **J**oannes.

Guido d'Arezzo (995-1050)

Tra l' aero

Kun π , ĉiam l' afero konverĝas al nombro utila kaj magia.	3,14159 26535	Que j'aime à faire apprendre un nombre utile aux sages ! Immortel Archimède, artiste ingénieur,
Infinite decimaloj anseras, ĝiseterne tra la paĝ' fantazia.	897 93238	Qui de ton jugement peut priser la valeur ? Pour moi, ton problème eut de pareils avantages.
Kiel nebulo el tabulo mara, tra nia universo kaj ĉe lekcioj,	46264 338327	Jadis, mystérieux, un problème bloquait Tout l'admirable procédé, l'œuvre grandiose
Diĝitvica poemo para-nepara, en harmonia kontinuo, dank l' iteracioj.	950 288419	Que Pythagore découvrit aux anciens Grecs. O, quadrature ! Vieux tourment du philosophe !
Senfine, l' cifera partituro oda, spaconube trakosmas plu.	71693 993	Insoluble rondeur, trop longtemps vous avez Défié Pythagore et ses imitateurs.
Vaporas ŝvebe π transcenda, glima procesio en stelaro-flu'.	7510 5820	Comment intégrer l'espace bien circulaire ? Former un triangle auquel il équivaudra ?
Proporcio mistera, kiel specimeno vian PI-an ĉenon memorebla do ?	9749 44592	Nouvelle invention : Archimède inscrira Dedans un hexagone, appréciera son aire,
Ĉar verso-skane samplon ekzameni, l' solvon igas vortlitera sumado.	3078 16406	Fonction du rayon. Pas trop ne s'y tiendra Dédoublera chaque élément antérieur ;
Vi feniksos zenite en reelo-serio, kulminos institute plirigora.	28620 899	Toujours de l'orbe calculée approchera ; Définira limite ; enfin, l'arc, le limiteur
Ĉirimede stelos en akademio, nombro-reĝo tra spac' pitagora.	8628 0348	De cet inquiétant cercle, ennemi trop rebelle ! Professeur, enseignez son problème avec zèle !

Mi fekis ĉi PI-aĵon kaj pekis ĉi fi-aĵon, kaj fine ricevis
trian premion ĉe Belartaj Konkursoj / Goteborg 2003

Rideto

Rideto ne kostas, multe valoras,
Riĉigas pli sian ricevanton,
Sed donacinton ne senigas.
Rideto daŭras nur efemeron
Sed eterne estas en memoro.
Eĉ riĉulo ne povas ĝin rezigni
Eĉ senulo meritas ĝin ricevi.
Ĝi bakas feliĉon, helpas negocon,
Sentebla pruvo de amikemo.
Rideto balzamas al tiu senforta,
Redonas kuraĝon al ĉiu malvigla.
Ĝin ne eblas aĉeti, nek prunti nek ŝteli,
Ĉar valoras nur kiam donita.
Kaj se hazarde vi iun renkontos
Kiu rideton ne plu scipovas,
Estu kompleza, la vian donacu,
Ĉar rideton neniu pli bezonas
Ol kiu ĝin provizi ne povas plu.

Un sourire ne coûte rien et produit beaucoup.
Il enrichit ceux qui le reçoivent
Sans appauvrir ceux qui le donnent.
Il ne dure qu'un instant
Mais son souvenir est parfois éternel.
Personne n'est assez riche pour s'en passer,
Personne n'est assez pauvre pour ne pas le mériter
Il crée le bonheur au foyer, soutient les affaires.
Il est le signe sensible de l'amitié.
Un sourire donne du repos à l'être fatigué,
Rend du courage aux plus découragés.
Il ne peut ni s'acheter, ni se prêter, ni se voler,
Car c'est une chose qui n'a de valeur
Qu'à partir du moment où il se donne.
Et si parfois vous rencontrez une personne
Qui ne sait plus avoir le sourire,
Soyez généreux, offrez-lui le vôtre...
Car nul n'a autant besoin d'un sourire
Que celui qui ne peut en donner aux autres.

Raoul Follereau, "Le Livre d'amour" (1920).

Mario Benedetti, né en 1920, était un écrivain uruguayen, romancier, dramaturge et poète. Universitaire et membre du *Movimiento de Liberación Nacional - Tupamaros*, la dictature militaire de son pays le contraint à l'exil entre 1973 et 1983. Il vécut ensuite en Espagne jusqu'en 2006, et résida de nouveau à Montevideo, capitale de son pays natal où il meurt le 17 mai 2009.

Mario Benedetti, naskita en 1920, estis urugvaja verkisto, romanisto, dramisto kaj poeto. Li estis universitatano kaj membro de Movimiento de Liberación Nacional - Tupamaros, kiam la militista diktaturo de lia lando trudis al li ekzilon inter 1973 kaj 1983. Li poste vivis en Hispanujo ĝis 2006, kaj revenis al Montevideo, ĉefurbo de lia nasko-lando, kie li mortis la 17^{an} de majo 2009^a.

Defendi la ĝojon

Defendi la ĝojon kvazaŭ tranĉeon
ĝin defendi kontraŭ skandalo kaj rutino
kontraŭ la mizero kaj mizeruloj
kontraŭ forestoj provizoraj
kaj tiuj definitivaj

defendi la ĝojon kiel principon
ĝin defendi kontraŭ ŝancelo kaj premsonĝo
kontraŭ neŭtralo kaj neŭtronoj
kontraŭ senpekaj fiaĵoj
kaj gravaj diagnozoj

defendi la ĝojon kvazaŭ standardon
ĝin defendi kontraŭ lumo melankolio
kontraŭ kanajloj kaj naivuloj
kontraŭ infarktoj kaj retoriko
endemioj kaj akademioj

defendi la ĝojon kiel destinon
ĝin defendi kontraŭ la fajro kontraŭ fajristoj
kontraŭ mortigoj sinaj kaj oninaj
kontraŭ ferioj kaj servuto
kontraŭ devigo esti ĝoja

defendi la ĝojon kvazaŭ certecon
ĝin defendi kontraŭ oksido kaj malpuro
kontraŭ la fama stompo de l' tempo
kontraŭ nokta frisko kaj oportunismo
prostituistoj de la rido

defendi la ĝojon kiel rajton
ĝin defendi kontraŭ la dioj kaj vintro
kontraŭ la majuskloj kaj la morto
familinomoj kaj kompatoj
kontraŭ hazardo
cetere kontraŭ la ĝojo

Defensa de la alegría

Defender la alegría como una trinchera
defenderla del escándalo y la rutina
de la miseria y los miserables
de las ausencias transitorias
y las definitivas

defender la alegría como un principio
defenderla del pasmo y las pesadillas
de los neutrales y de los neutrones
de las dulces infamias
y los graves diagnósticos

defender la alegría como una bandera
defenderla del rayo y la melancolía
de los ingenuos y de los canallas
de la retórica y los paros cardiacos
de las endemias y las academias

defender la alegría como un destino
defenderla del fuego y de los bomberos
de los suicidas y los homicidas
de las vacaciones y del agobio
de la obligación de estar alegres

defender la alegría como una certeza
defenderla del óxido y la roña
de la famosa pátina del tiempo
del relente y del oportunismo
de los proxenetas de la risa

defender la alegría como un derecho
defenderla de dios y del invierno
de las mayúsculas y de la muerte
de los apellidos y las lástimas
del azar

y también de la alegría

Mario Benedetti

Kio okazus ...?

Kio okazus se iam
ni ellitiĝus malkovrante
ke ni estas majoritato ?

Kio okazus se
subite maljustaĵon, nur unu,
malakceptus ĉiuj,
ĉiuj el ni, ĉiuj,
ne iuj, ne kelkiuj, sed ĉiuj ?

Kio okazus se
anstataŭ resti disaj
ni multiĝus, ni aldoniĝus
malfortige la oponantojn
de nia alpaŝo?

Kio okazus se
ni organizus nin
kaj samtempe alfrontus
sen armiloj, silente,
multope, milionope,
rigardante la vizaĝojn
de la premantoj, sen vivuoj,
sen aplaŭdoj, sen ridetoj,
sen komplikaj manpremoj,
sen himnoj partizanaj,
sen himnoj ?

Kio okazus se mi tion celus
por vi tiom fora,
kaj vi por mi tiom fora, kaj ambaŭ por
l' aliaj tiom foraj,
kaj l' aliaj por ni
kvankam malproksimaj ?

Kio okazus se krio
de kontinento fariĝus
ĉiu-kontinenta ?

Kio okazus se ni agus
anstataŭ lamenti ?

Kio okazus se ni abolus
la landlimojn kaj antaŭenirus
antaŭen kaj antaŭen
kaj antaŭen ?

Kio okazus se ni bruligus
ĉiujn flagojn por
konservi nur unu, la nian,
la ĉiesan, aŭ preferinde
neniun ĉar
tio ne utilas ?

Kio okazus se subite
ni ĉesus esti patriotoj
por resti homoj ?

Mi ne scias ... sed demandas min :
Kio okazus ...?

¿Qué pasaría...?

¿Qué pasaría si un día
despertamos dándonos
cuenta de que somos mayoría?

¿Qué pasaría si de pronto
una injusticia, sólo una,
es repudiada por todos,
todos los que somos, todos,
no unos, no algunos, sino todos?

¿Qué pasaría si en vez de
seguir divididos nos
multiplicamos, nos sumamos
y restamos al enemigo que
interrumpe nuestro paso?

¿Qué pasaría si nos
organizáramos y al mismo
tiempo enfrentáramos
sin armas, en silencio,
en multitudes, en millones de
miradas la cara de los
opresores, sin vivas,
sin aplausos, sin sonrisas,
sin palmadas en los hombros,
sin cánticos partidistas,
sin cánticos?

¿Qué pasaría si yo pidiese
por ti que estás tan lejos,
y tú por mí que estoy tan lejos, y ambos por
los otros que están muy
lejos y los otros por
nosotros aunque estemos lejos?

¿Qué pasaría si el grito
de un continente fuese
el grito de todos los continentes?

¿Qué pasaría si pusiésemos
el cuerpo en vez de lamentarnos?

¿Qué pasaría si rompemos
las fronteras y avanzamos
y avanzamos y avanzamos
y avanzamos?

¿Qué pasaría si quemamos
todas las banderas para
tener sólo una, la nuestra,
la de todos, o mejor
ninguna porque no
la necesitamos?

¿Qué pasaría si de pronto
dejamos de ser patriotas para
ser humanos?

No sé... me pregunto yo :
¿Qué pasaría...?

Mario Benedetti

La stria fuŝ'

"Nu, venu do por l' maten-manĝo !"
"Jam satas mi ĉar en ĉielo
Apenaŭ aperas tagheloj
Konsternas l' azura aranĝo
Flagretas sub suno pikseloj
Avioj fulgozon postlasas
Moroze fumspuroj amasas"

Vera cirus', falsa cirus' !
Ĉie svarmas la stria fuŝ' !

"Sed ĉu vere gravas ? Venu do !"
"Ja gravas ! Observu atente
Ĉi lazuron for oriente.
Dis-stange fatrasas *mikado*
Plektiĝas l' eterna vagado
Super ni, invado embuska
Sur fono purpure krepuska

Rigardu kiel evoluas
Longiĝas ĉi strioj misfole
Treniĝas sur bluo tavolo
Kaj ĉiudirekte tra-fluas.
Nu sorĉe meteo voduas
Inter super cis trans kaj preter
Ĉi nuboj ne rampas pro veter' !

Ja flugas avioj pelmele :
Avidon de lazur' afiŝas
Aroge sunlumon forviŝas
Je Tero prifajfas kruuele
Kondutas eole ĉiele
Aere eteras lerta flos'
Asfalte sengloras l' albatros'

Tiom da revigaj vojaĝoj,
Oferto reklame aserta
Por Hawai, NovJorko kaj Djerba,
Da lokoj malkostaj kun plaĝoj,
Ke oni aspektas sencerba
Kiam al tablanoj forume
Sugestas semajnon tendume.

Jam urĝe abeloj avertas
Mi revas ĉi frajton sendunga.
Imagas morgaŭon senfluga.
Ĉu restas do solvo aperta ?
Sen kerosen' spure lanuga
La nuboj plu ŝvebos sen blinko ...
Mi dankas pro kuna kaftrinko !"

Le ciel en otage

Dis-moi, quand viens-tu déjeuner ?
Pas faim quand je vois dans le ciel
À peine le jour est-il levé
Un effarant chassé-croisé
D'avions brillants sous le soleil
Laissant en trace derrière eux
Un long panache vapoureux

Ref : cirrus, faux cirrus ? vrais cirrus ?
Pour sûr, cirrus avionicus

Est-ce donc si grave, viens donc manger !
Comment pas grave, regarde mieux.
Tu vois là-bas tout ce ciel bleu
Au mikado me fait penser.
Les lignes ressemblent à des baguettes
Qui s'entrecroisent au-dessus de nos têtes
Sur fond de rougeurs matinales. (Ref)

Maint'nant regarde ce qu'elles deviennent
Les strates s'allongent à tire d'aile
Ciel de traîne dit la météo
Faut pas nous prendre pour des gogos
Passant dessus, passant dessous
Elles se rejoignent comme des moutons
Et jettent leur ombre sur les vallons (Ref)

Bien sûr que les avions, ça vole :
Redoutables voleurs de soleil !
Assoiffés d'un azur bleu ciel
Ils se prennent pour les fils d' Éole
Et de la terre, se foutent pas mal.
Perdus dans leur rêve de hauteurs,
Ils fuient la grisaille du tarmak.(Ref)

Y a tant de rêves dans les voyages,
Tant de lieux pas chers et de plages,
De pub et d'offres racoleuses,
Djerba, Shangai, New-York, Hawai
Qu'on passe pour un décérébré
Quand on propose à la table
Une s'maine de camping à Maubeuge. (Ref)

Reste-t-il une porte entrouverte ?
Déjà les abeilles sonnent l'alerte
C'est mauvais signe pour la planète
Je fais le rêve que demain
Les avions seront en chômage
Las de flotter sur les nuages...
Merci pour la tasse de café !

Nicole Lançon
30 novembre 2008

La soldato de Marsala
(pacisma kanto)

Svarme pli ol mil, sturma misio
El Italio kaj aliloke
Kun Garibaldi, tra Sicilio
Plu almarŝadis ni tirajlore :
Kiam mi solis sur l' ebenaĵo
Blanka figuro fronte aŭdacis
Apenaŭ dudekjara soldato ;
Reĝa blazono lia minacis.
Sian fusilon celis malice,
Tion li rajtis ; propran mi trafis,
Li kvarpaŝis, mi same laŭvice,
Li mise celis, mi celen pafis.

Abomenata estu milito
Kiu nin puŝas tiel konduiti ;
Mi de Marsala, rekte de l' vito
Glason da vino emus forgluti.

Li renverse turniĝis disfala.
Min diable li kial mispafis ?
Kompatinda ! Li estis mortpala ;
Mi sukure, impete alpaŝis.
Nu ! Ne venkon mi glore elkantis,
Sed mi pite almozis pardonon.
Li soifis, mian akvon frandis,
El l' botelo avidis duonon.
Mi lin sidigis dorson ĉe trunko
Kaj viŝis lian frunton senŝvita :
"Jam marmore aspektas ĉi frunto
Espereble nur estas vundita ... !"

Abomenata estu milito
Kiu nin puŝas tiel konduiti ;
Mi de Marsala, rekte de l' vito
Glason da vino emus forgluti.

Lian vundon mi volis bandaĝi,
Levis roverson de l' uniformo ;
Sed la kuglo sen zorgo domaĝi,
De la flanko migradis al l' koro.
El poŝ' ĉemiza, sanga tolaĵo,
Bildo kolora, poze konvena
De maljunulin', linda vizaĝo
Kiu ridetis, milde serena.
Nur Dio scias kiel mi vivis,
Sed mi ĝis morto vidos eterne,
Tiun junulon kiu senmovis
Kaj bonulinon plori ĉagrene.

Estu milito abomenata
Kiu nin puŝas tiel konduiti ;
Ja okazis en Marsala.
La mian glason oni forportu !

Le soldat de Marsala
(chanson pacifiste)

Nous étions au nombre de mille,
Venus d'Italie et d'ailleurs,
Garibaldi, dans la Sicile,
Nous conduisait en tirailleurs :
J'étais un jour seul dans la plaine
Quand je trouve en face de moi
Un soldat de vingt ans à peine
Qui portait les couleurs du roi.
Je vois son fusil se rabattre :
C'était son droit ; j'arme le mien,
Il fait quatre pas, j'en fais quatre,
Il vise mal, je vise bien.

Ah ! Que maudite soit la guerre
Qui fait faire de ces coups-là ;
Qu'on verse dans mon verre
Le vin de Marsala !

Il fit demi-tour sur lui-même.
Pourquoi diable m'a-t-il raté ?
Pauvre garçon ! il était blême ;
Vers lui je me précipitai.
Ah ! je ne chantais pas victoire,
Mais je lui demandai pardon.
Il avait soif, je le fis boire,
D'un trait il vida mon bidon.
Puis je l'appuyai contre un arbre
Et j'essayai son front glacé :
Son front sentait déjà le marbre.
S'il pouvait n'être que blessé... !

Ah ! Que maudite soit la guerre
Qui fait faire de ces coups-là ;
Qu'on verse dans mon verre
Le vin de Marsala !

Je voulus panser sa blessure,
J'ouvris son uniforme blanc ;
La balle, sans éclaboussure,
Avait passé du cœur au flanc.
Entre le drap et la chemise,
Je vis le portrait en couleurs
D'une femme vieille et bien mise
Qui souriait avec douceur.
Depuis, j'ai vécu Dieu sait comme,
Mais tant que cela doit durer,
Je verrai mourir le jeune homme
Et la bonne dame pleurer.

Ah ! Que maudite soit la guerre
Qui fait faire de ces coups-là !
Qu'on emporte mon verre !
C'était à Marsala.

Gustave Nadaud

Mia lasta vojaĝo

Fineblos vojaĝo mia lasta
estiel fola herbo,
rigardo mia lasta
estiel kata okulo
blindigita de aŭta lumo,
kaj kareso mia lasta
estiel algo
spiranta la tajdon.
Al ĉiu sia hejmo,
estu la mia la vento.

De kie mi estas ?

De kie mi estas
Tion mi ne scias
Mi iam hazarde falis
de fenestro de mureto
aŭ de multe pli alte,
de meteoro de vezika folo.

Eĉ mis-amate,
l' aliajn al la miaj mi preferis ;
Ili min fremdigis kaj tio permanentis.
Ĉu esti ie hedero ĉu dolĉa tropeolo ?
Loĝi en heĝo
Ĉi ora koko, rivero !

Sed ja « homo ĉie-fremda »
ĉu siahejme ĉu aliloke,
plu oni restu la ekzilito,
la nekonato.

Fine, fonti de tio, aŭ de ĉi tio.
Sed kieas do « Ĉi tie » ?
Raporti sian historion
eĉ sen esti aŭskultata ;
krome, kelkaj pakaĵoj
ja tro pezaj
laŭ la jaroj ...

Ne malfruiĝu ĉi-grunde,
en l' aero fremdas neniuj.
Alvelu al l' oceano
ankoraŭ ne sub kontrolo.

Mon dernier voyage

Mon dernier voyage sera peut-être
celui d'une herbe folle,
mon dernier regard
celui des yeux d'un chat
ébloui par des phares,
et ma dernière caresse
celle d'une algue
respirant la marée.
A chacun sa demeure,
je préfère celle du vent.

Alain Pizerra

D'où je suis ?

D'où je suis
Je n'en sais rien
Tombé un jour comme ça
d'une fenêtre d'un muret
ou de beaucoup plus haut,
météore ou bulle folle.

Tant qu'être mal aimé
aux miens j'ai préféré les autres ;
Ils m'ont fait l'étranger et cela s'est gravé.
Etre lierre quelque part ou gentille capucine ?
Habiter un buisson
ce coq d'or, une rivière !

Mais c'est « l'homme de nulle part »
l'exilé, l'inconnu
chez lui ou bien ailleurs
qu'il faut toujours rester.

Etre enfin de ceci, ou encore de cela.
Mais où est-ce donc « Ici » ?
Répéter son histoire
sans même être écouté ;
en plus, quelques bagages
bien trop lourds à porter
à mesure des années ...

Ne pas tarder ci-bas,
dans l'air, pas d'étranger.
Cingler vers le grand large
pas encore sous scellés.

Alain Pizerra

Io ploras en mia kor'

Io ploras en mia kor'
Same pluvas sur la kvartal' ;
Kiuspeca vora langvor'
Trasorbiĝas en mia kor' ?

Dolêa bruo de la pluvo
Super grundo kaj tegmentoj !
Por ĉi koro en enuo,
Tintas kanto de la pluvo !

Ploras io senkiala
Tra ĉi koro en torporo.
Kion ! Ĉu perfid' normala, ...
Tiu morto senkiala ?

Jen la peno plej malbona
Ne scipovas diri kial
Nek amema nek amsena
Mia koro tiom pena !

Il pleure dans mon coeur

Il pleure dans mon coeur
Comme il pleut sur la ville ;
Quelle est cette langueur
Qui pénètre mon coeur ?

Ô bruit doux de la pluie
Par terre et sur les toits !
Pour un coeur qui s'ennuie,
Ô le chant de la pluie !

Il pleure sans raison
Dans ce coeur qui s'écoeur.
Quoi ! nulle trahison ?...
Ce deuil est sans raison.

C'est bien la pire peine
De ne savoir pourquoi
Sans amour et sans haine
Mon coeur a tant de peine !

Paul Verlaine
Romances sans paroles (1874)

Eble sufîçus

Eble sufîçus
Momento plia
Morto kapricus
Sed man' amika
Tiam alvenis
La mian prenis

Kiu redonis
Perditan belon
Al l' tagoj bonis
Kaj sian veron
Al l' vasta somer'
De l' homa afer'

Premis min sufer'
Fakte ne sciis
Je kiu koler'
Brakpar' sufîçis
Kolringa aer'
Por viva tener'

Nur eça premo
Ensonga gesto
Leĝera tremo
Varma kareso
Pli ĝuste flustro
Ĉe mia ŝultro

Frunto-apogo
Okula brilo
Ĉe mi en nokto
Kaj ŝajnis ĉio
Tritiko-ondo
En mia mondo

Tenera ĝarden'
Fresfalça odor'
Kresko de verben'
Batas mia kor'
Vigle ĉe parfum'
Dolça de la lum'

Il n'aurait fallu

Il n'aurait fallu
Qu'un moment de plus
Pour que la mort vienne
Mais une main nue
Alors est venue
Qui a pris la mienne

Qui donc a rendu
Leurs couleurs perdues
Aux jours aux semaines
Sa réalité
A l'immense été
Des choses humaines

Moi qui frémissais
Toujours je ne sais
De quelle colère
Deux bras ont suffi
Pour faire à ma vie
Un grand collier d'air

Rien qu'un mouvement
Ce geste en dormant
Léger qui me frôle
Un souffle posé
Moins une rosée
Contre mon épaule

Un front qui s'appuie
A moi dans la nuit
Deux grands yeux ouverts
Et tout m'a semblé
Comme un champ de blé
Dans cet univers

Un tendre jardin
Dans l'herbe où soudain
La verveine pousse
Et mon coeur défunt
Renaît au parfum
Qui fait l'ombre douce

Louis Aragon (1956)

muziko : Léo Ferré

https://www.youtube.com/watch?v=vCG4_Uc23-Q

La ruĝa afiŝo

Nek al gloro nek kompto vi sopiris
Nek orgen' nek preĝo por la agoniant'
Jam dek unu jaroj dek unu pasis jam
Per viaj armiloj simple vi rezistis
Morto ne blindigas l' menson de Partizan'

Portretoj viaj kovris murojn de la urb'
Malhele barbaĉa harhirte grimaca
L' afiŝo sang-ruĝa makulo minaca
Ĉar nom' via ne prononceblas sen perturb'
Celis timon ĉe la pasanto surstrata

Vin neniu videble francoj preferis
L' pasanto preteren rigardis tuttage
Sed en noktotrudo mano skribis vage
Sub viaj fotoj POR FRANCIO PEREIS
Kaj la morna maten' helis esper-flagre

Ĉie unuforma prujno-blanko vastas
Februare por via moment' ultima
Tiam unu el vi diris firme kalma
Feliĉon al ĉiuj, vi kiuj plurestas
Mi mortos senhate al l' popol' germana

Adiaŭ al la pen' Adiaŭ al l' plezur'
Adiaŭ al la viv' al la lum' al la vent'
Edziniĝu feliĉu vidu min en pens'
Al vi kiu pluvivos sub l' blua lazur'
Kiam paco regos iam en Erevan

Granda suno vintra helas al la senfin'
Belas la natur' min doloras korofend'
Ĉe niaj paŝoj justico fluos al venk'
O Mélinée amo mia, mia orfin'
Mi diras vivu, idon nestu via ventr'

Kunestis dudek tri kiam pafoj floris
Dudek tri fremduloj tamen niaj fratoj
Dudek tri vivvole mortfalis sub frapoj
Dudek tri tro frue sian koron donis
Dudek tri kriis Francujo ĉe la pafoj

L'affiche rouge

Vous n'avez réclamé la gloire ni les larmes
Ni l'orgue ni la prière aux agonisants
Onze ans déjà que cela passe vite onze ans
Vous vous étiez servis simplement de vos armes
La mort n'éblouit pas les yeux des Partisans

Vous aviez vos portraits sur les murs de nos villes
Noirs de barbe et de nuit hirsutes menaçants
L'affiche qui semblait une tache de sang
Parce qu'à prononcer vos noms sont difficiles
Y cherchait un effet de peur sur les passants

Nul ne semblait vous voir Français de préférence
Les gens allaient sans yeux pour vous le jour durant
Mais à l'heure du couvre-feu des doigts errants
Avaient écrit sous vos photos MORTS POUR LA FRANCE
Et les mornes matins en étaient différents

Tout avait la couleur uniforme du givre
A la fin février pour vos derniers moments
Et c'est alors que l'un de vous dit calmement
Bonheur à tous Bonheur à ceux qui vont survivre
Je meurs sans haine en moi pour le peuple allemand

Adieu la peine et le plaisir Adieu les roses
Adieu la vie adieu la lumière et le vent
Marie-toi sois heureuse et pense à moi souvent
Toi qui vas demeurer dans la beauté des choses
Quand tout sera fini plus tard en Erevan

Un grand soleil d'hiver éclaire la colline
Que la nature est belle et que le coeur me fend
La justice viendra sur nos pas triomphants
Ma Mélinée ô mon amour mon orpheline
Et je te dis de vivre et d'avoir un enfant

Ils étaient vingt et trois quand les fusils fleurirent
Vingt et trois qui donnaient leur coeur avant le temps
Vingt et trois étrangers et nos frères pourtant
Vingt et trois amoureux de vivre à en mourir
Vingt et trois qui criaient la France en s'abattant

Louis Aragon (1956)

muziko : Léo Ferré

https://www.youtube.com/watch?v=6HLB_EVtJK4

Ni ne plu mortigu

Ni ne plu mortigu
La vivon la ĝojon de la mondo
Ni ne plu frakasu
La ludojn, infana bela rondo

Ni devos domaĝi
De l' feliĉo ventojn
laŭ niaj padoj
kaj riveroj

Ni devos donaci
Al l' ploranto
iom da varmo
de nia somero

Ni ne plu misuzu
Ĉi okazojn fariĝi helpemaj
Ni ne plu rifuzu
Al l' nacioj restadi liberaj

Ni devos akcepti
Ke gentoj aliaj venos
vivi en nian hejmon

Ni devos donaci
Al ĉiuj mortantaj, nian ĉielon,
amikemon

Ni ne plu mortigu
Ni ne plu mortigu

Il ne faut plus tuer

Il ne faut plus tuer
défaire la vie, la joie du monde
il ne faut plus briser
les jeux des enfants, leurs jolies rondes

Il nous faudra laisser
les vents du bonheur
couvrir nos coteaux
et nos sentiers

Il nous faudra donner
aux faibles qui pleurent
notre ciel de printemps
un peu d'amitié

Il ne faut plus tuer
brûler les raisons de la charité
Il ne faut plus renier
le droit des nations à leur liberté

Il nous faudra laisser
les gens de couleur
vivre leur vie dans l'équité

Il nous faudra donner
à tous ceux qui meurent notre ciel de printemps
un peu d'amitié

Il ne faut plus tuer
Il ne faut plus tuer

Glenmor

<https://www.youtube.com/watch?v=GnE03HEVR4U>

Ekstere ĉio floras

Ekstere ĉio floras,
mi gastas en decembron.
L' eniro de mia hejm'
fridejo vasta estas,
kaj fajro-estingilo
hodiaŭ senutilas.

Ekstere ĉio floras.

Vestiĝo de pratempo,
la ventolilo
al l' korp' like ŝvita,
protektis de torporo.
Nun pimpas ĝi orname
kvazaŭ pec' de muzeo,
inerta parentezo
de mia amo frosta.

Ekstere ĉio splendas,
mi gastas en decembron.
L' tegmento de mia hejm'
vuale lumon stompas.
Ekstere ĉio splendas.

Ekstere ĉio splendas,
mi venas en decembron
La sojlo de mia hejm'
binare limo-breĉas.
L' kurento kontinua
de pluso al minuso,
laŭdrate ĝian fluon
mi vane rezistancas,
espere kurt-cirkvito,
ke sparku la ŝaltilo.
Elektron kaj ĥemion
mi tute abomenas !
La fajro-estingilo ...

Ke granda incendio
el arda ventolilo,
varmigu miajn horojn.
Ke pluvu plej abunde
kaj cindro kaj elŝvito.
Ke granda incendio
varmigu miajn horojn.
Ke pluvu plej abunde
kaj cindro kaj elŝvito.

Dehors tout refléurit

Dehors tout refléurit
J'entre dans l'hiver
L'entrée de mon logis
Est un grand frigidaire
La lance à incendie
Un objet délétere

Dehors tout refléurit

Vestige d'un ancien temps
Le ventilateur
Au corps ruisselant
Evitait la torpeur
N'est plus qu'un ornement
Une pièce de musée
Le trait d'union figé
De mes amours gelées

Dehors tout respandit
J'entre dans l'hiver
Le toit de mon logis
Me cache la lumière
Dehors tout respandit

Dehors tout respandit
J'entre dans l'hiver
Le pas de mon logis
Est un système binaire
Le courant continu
Du plus vers le moins
A suivre son chemin
Je résiste en vain
J'espère le court-circuit
Dans le commutateur
J'ai toute la chimie
Dans le collimateur
La lance à incendie

Du ventilateur
Qu'un grand incendie
Réchauffe mes heures
Que tombent en pluie
La cendre et la sueur
Qu'un grand incendie
Réchauffe mes heures
Que tombent en pluie
La cendre et la sueur

Delphine Coutant

<https://www.youtube.com/watch?v=rXCj38ZU5UM>

Por plu aperi supre de l' afiŝo

Franca lingvo jam eksmodas
Blinde pluas la progreso
Por fariĝi nun konata
Angle kanti preferindas.
Kaj mi kaj mi senpripensa
Ĉar delonge tro silenta
Tion devus enkalkuli.
Mi rapide revojiĝu
Vigle studu per assimil
Kun my tailor in the pocket
Por mieni ĉi stultulojn
Devenintajn de l' Ohio.
Por famiĝi plu sur l' afiŝ'
Mi ŝafbleku usonaĉe
Por kongrui la etoson
Miel-voĉu mi en ingliš.

Singing in the rain, Singing in the rain, Singing in my heart,
Singing in the woods, Singing in the blood, It's not super,

Se nenio plu farindas
Por eskapi la mizeron
Se nur tiel en ĉi mondo
Interesi mas-mediojn.
Se la francan la bretonan
Okcitanan aŭ l' aŭvernjan
Kiel iuj tede gurdas
La show-business abomenas,
Tamen fine avantaĝas
L' evoluo sen reteno
Eblos kanti sen cenzuro
Kiam gento ne komprenos.
Por obei la epokon
Mi ŝaf-beos usonaĉe
Por furori plu sur l' afiŝ'
Miel-voĉos mi en ingliš.

Kamaradoj ja ridaĉos
Pri akĉento mia fuŝa
Ĉar ĵaluzos mian famon
Kiam kanton mi buŝkaĉos.
El sondadoj certe pravaj
Scias ni ke decidistoj
Pri la gusto de l' mez-franco
Konas ĉion ĝis profundo.
Ne facilas tiel plaĉi
Al neniuj kaj al ĉiuj
Sed ne kredu ke ne gravas
Ĉar nin lingvas kolonien.
Por famiĝi plu sur l' afiŝ'
Mi ekpensas usonaĉe
Kiam l' feeling min ektrafos
Mi furoros en la ingliš.

Pour être encore en haut de l'affiche

La langue française a fait son temps
Paraît qu'on arrête pas l' progrès
Que pour être vedette à présent
Il vaut mieux chanter en anglais.
Et moi et moi pauvre de moi
Qui me tais depuis si longtemps
Faudrait qu' je fasse gaffe à tout ça
Que je m' reconvertisse à temps.
J' ai pris la méthode assimil
My tailor in the pocket
Pour avoir l' air comme les débiles
D' arriver du Massachusetts.
Pour être encore en haut d' l' affiche
Faudrait qu' je susurre en anglische
Si j' veux coller à mon époque
Il me faut braire en armerloque.

S'il n'y a plus rien d'autre à faire
Pour échapper à la misère
C'est l' seul moyen ici-bas
D' intéresser les mass média.
Si le français ou le breton
Si l' occitan ou l' auvergnat
Le show-business il aime pas ça
Comme on dit sur tous les tons
Y a p' t-êtr' quand même un avantage
A cette évolution sans frein
On pourra chanter sans entrave
Quand les gens n' y comprendront rien.
Pour être encore en haut d' l' affiche
J' pourrai susurrer en anglische
Si je n' veux pas finir en loque
Je pourrai braire en armerloque.

J' entends les copains ricaner
Que j' ai plutôt l' accent manouche
Ils sont jaloux d' mon p' tit succès
Quand j' ai d' la bouillie plein la bouche.
Grâce aux sondages indiscutables
Dans l' âme du français moyen
Il paraît que nos responsables
Savent tout du goût de chacun.
Plaire à tout l' monde et à personne
C' est pas donner à n' importe qui
N' allez pas croire qu' ils s' en tamponnent
S' ils nous transforment en colonie.
Pour être encore en haut d' l' affiche
J' commence à penser en anglische
Quand j' aurai le feeling ad hoc
Ça va faire mal en armerloque.

Jean Ferrat

https://www.youtube.com/watch?v=_gGExAvXuCE

Naskiĝo

Mi permane teron ungas
jam vizaĝon vekas suno
ja en krio trankviligas
nun okulon vokas lumo
El ĉi svaga memorejo
kiun tempo fajle dampas
pri la supla dolĉa tego
kiun pene mi elrampas

Naskiĝo

Mi tralukas al tiu mondo
al la lum' de ĉi momento
el la font' de nova ondo
ĉiu son', ĉiu komento
Lanta danco de figuroj
dismoviĝas en la spaco
pro la stompo de okuloj
obtuziĝas jam en spasmio

Naskiĝo

Mi lacertos sur la ventro
por eklerni pri la mondo
vivas ĝuste en la centro
de kirligita varma rondo.
Mi kriŝiros en silenton
per voĉido tro fragila
mi almozas mian eston
kiel trampo nepagiva.

Naskiĝo

Naissance

Mes mains s'agrippent à la terre
l'aube lave mon visage
dans un cri qui me soulage
je m'éveille à la lumière
Une vague souvenance
qui serpente et qui se cache
d'un cocon flexible et dense
dont il faut que je m'arrache.

Naissance

J'écarquille sur le monde
la lueur de mes prunelles
chaque son, chaque seconde
est une source nouvelle.
Rondes lentes et formes vagues
au travers de la lumière
qui se meuvent et qui divaguent
estompées par mes paupières.

Naissance

Je vais ramper sur le ventre
pour appréhender le monde
je vis et je suis le centre
d'une sphère chaude et profonde.
Je vais trouer le silence
de mes cris rauques et fragiles
comme un mendiant malhabile
je mendie ma subsistance.

Naissance

Danielle Messia

<https://www.youtube.com/watch?v=EHWYPPA-X4s>

La lavendo

Via haŭta porec'
ellikas je dezir'
vi pro longa forest'
sopiras en suspir'
Se mi sen forto
se stari ne povas plu
sternu mian korpon
ĉe l' supro de l' Ventoux

Kaj kovru min je lavend'
je sal' de via plor'
antaŭ l' neĝ' de decembr'
antaŭ ol velkos la flor'
Nun volas mi morti
en april' reŝosi
nun volas mi morti
en april' reŝosi

Via haŭt' ĉiam blanka
sub la sun' bruniĝos
kaj frukto surbranĉa
sub la sun' sukiĝos
Kaj mi sen forto
ne povas stari plu
sternu mian korpon
ĉe l' supro de l' Ventoux

Kaj kovru min je lavend'
je sal' de via plor'
antaŭ l' neĝ' de decembr'
antaŭ ol velkos la flor'
Forpasi volas mi nun
en april' reŝosi
forpasi volas mi nun
en april' reŝosi

Mia haŭt' ne tiel juna
l' adiaŭon scias
sub l' ĉiel' aŭtuna
mi nun endormiĝas
Febliĝas jam mi
ne povas stari plu
Lasu min tie ĉi
ĉe l' supro de l' Ventoux

Kaj kovru min je lavend'
je sal' de via plor'
antaŭ l' neĝ' de decembr'
antaŭ ol velkos la flor'
Se mi nun mortas ve
neniam aĝos dudek
L' floroj vere mortas ne
vivas re en printemp'

La lavande

Ta peau n'est pas étanche
elle coule de désir
de trop longues absences
et d'envie tu soupire
Si je m'affaiblis
que je ne tiens plus debout
allonge mon corps ici
tout en haut du Ventoux

Et couvre-moi de lavande
et de sel si tu pleures
avant la neige de décembre
avant que ne fanent les fleurs
Je veux mourir maintenant
et renaître au printemps
je veux mourir maintenant
et renaître au printemps

Ta peau toujours si blanche
au soleil va noircir
des fruits sur cette branche
au soleil vont mûrir
Et je m'affaiblis
que je n'tiens plus debout
allonge mon corps ici
tout en haut du Ventoux

Et couvre-moi de lavande
et de sel si tu pleures
avant la neige de décembre
avant que ne fanent les fleurs
Je veux mourir maintenant
et renaître au printemps
je veux mourir maintenant
et renaître au printemps

Ma peau n'est pas si jeune
elle connaît les adieux
et sous un ciel d'automne
je ferme enfin les yeux
Et je m'affaiblis
je ne tiens plus debout
Alors laisse-moi ici
tout en haut du Ventoux

Et couvre-moi de lavande
et de sel si tu pleures
avant la neige de décembre
avant que ne fanent les fleurs
Mais si je meurs maintenant
je n'aurai jamais 20 ans
Les fleurs ne meurent pas vraiment
elles renaissent au printemps

Claire Pommet (scen-nomo Pomme)

<https://www.youtube.com/watch?v=BgbQoNchOX4>

Multnombraj

Fluos tia nia viv'
ĉar en senĉes', vin volas mi
Ĉar kune vojis ni, nur mi kaj vi
Des bone pli sed
ho, tiun amon ne regas ni, tia feliĉ'
Al taga fuŝ', ne emas mi
ĉar tia am', valoras plej

Multaj kiuj allogas
multaj ĉe mi kiuj dancas plu
Eĉ se rava ilia bel'
certu ke nur vin okulsekvas mi
La voj' tajdos disa kriz'
jen sor jen sob, pasos la temp'
La voj' ŝtonos laŭ dekliv'
danĝere kruta por ni
Ho, ni ne regas, nia ĵaluz' min plaĉas ne, sed
nu, viajn kisojn, emas mi nur, esti via

Multaj kiuj allogas
multaj ĉe mi kiuj dancas plu
Eĉ se lerta ilia sprit'
certu ke nur vin okulsekvas mi
Multaj kiuj allogas
multaj ĉe mi kiuj dancas plu
Eĉ se Kreza ilia riĉ'
certu ke nur vin okulsekvas mi

Hu, hu

Multaj kiuj fiĝenas
multaj tiuj kiuj malvenkas
Eĉ en kirliĝa tumult'
viajn okulojn, fine volis mi

Nombreux

Ce sera comme on s'était dit
Car tout le temps, c'est toi qu'je veux
Et comme on avait pris la route à deux
Ce sera bien mieux mais
Oh, ça nous dépasse tout cet amour, c'est si heureux
Les mauvais jours, moi je m'en passe
Car cet amour, c'est si précieux

Nombreux sont ceux qui séduisent
Nombreux sont ceux qui dansent près de moi
Ils pourraient être les plus beaux
Tu sais que mes yeux ne suivent que toi
La route sera pleine de crises
Les hauts les bas, ça nous passera
La route sera pleine de pentes
Dangereuses et brûlantes pour nous
Oh, ça nous dépasse, nos jalousies ça me plaît pas, mais
Oh, quand tu m'embrasses, j'ai qu'une envie, c'est d'être à toi

Nombreux sont ceux qui séduisent
Nombreux sont ceux qui dansent près de moi
Ils pourraient être les plus drôles
Tu sais que mes yeux ne suivent que toi
Nombreux sont ceux qui séduisent
Nombreux sont ceux qui dansent près de moi
Ils pourraient être les plus riches
Tu sais que mes yeux ne suivent que toi

Ouh, ouh

Nombreux sont ceux qui sévissent
Nombreux sont ceux qui perdent au combat
Tout pourrait changer autour
Moi j'avouais tes yeux, ça ne changera pas

Angèle Van Laeken

<https://www.youtube.com/watch?v=pyV1ceHcFj0>

Reĝino via

Se foje ŝi sciis kiel
Kiel vi rigardas ŝin, ŝi certe timus
Se foje ŝi sciis kiel
Kiel vi imagas ŝin, ŝi vin ŝancelus
Sed pasos pasos temp'
Ĝi povus doni l' oportu-non vin trovi
Necesos kroma temp' ĝis ŝi
forĝesos siajn antaŭ-juĝojn

Vi volus ŝin via nokta reĝin'
Eĉ se reĝina par' konvenas ne
Sed volus ŝin via nokta reĝin'
Vi reĝojn prifajfas ĉar emas ne

Se foje ŝi sciis kiel
Kiel vi rigardas ŝin, eĉ kiel knabin'
Se foje ŝi sciis kiel
Kiel vi povus ami, ja ŝin pli ol lin
Sed eble iam ŝi
ekvidos l' amon kiun povus vi ŝin doni
Mi kredas je ĉi amoj kiuj foje
bone finiĝas

Vi volus ŝin via nokta reĝin'
Eĉ se reĝina par' konvenas ne
Sed volus ŝin via nokta reĝin'
Vi reĝojn prifajfas ĉar emas ne
Vi volus ŝin via nokta reĝin'
Eĉ se reĝina par' konvenas ne
Sed volus ŝin via nokta reĝin'
Vi reĝojn prifajfas ĉar emas ne

Sed ŝajne iam ŝi akceptos ke
vin ankaŭ ŝi pli multe amos
Mi kredas je ĉi amoj dum la gento
ilin ne kredas

Vi volus ŝin via nokta reĝin'
Eĉ se reĝina par' konvenas ne
Kaj volus ŝin via nokta reĝin'
Vi reĝojn prifajfas ĉar emas ne
Vi volus ŝin via nokta reĝin'
Eĉ se reĝina par' konvenas ne
Nu volus ŝin via nokta reĝin'
Vi reĝojn prifajfas ĉar emas ne

Ta reine

Si seulement elle savait comment
Comment tu la regardais, elle serait effrayée
Si seulement elle savait comment
Comment tu l'imaginais, elle pourrait t'abîmer
Mais laisse, laisse le temps
Il pourrait vous donner une chance de vous retrouver
Il lui faudra du temps, c'est sûr,
Pour oublier tous ses préjugés

Mais tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Même si deux reines c'est pas trop accepté
Mais tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Toi, les rois tu t'en fous c'est pas c'qui t'plaît

Si seulement elle savait comment
Comment tu l'envisageais, même si t'es une fille
Si seulement elle savait comment
Comment tu pourrais l'aimer tellement plus que lui
Mais peut-être qu'un jour
Elle verra tout l'amour que tu pourrais lui donner
Moi je crois aux histoires qui peuvent parfois
Bien se terminer

Mais tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Même si deux reines c'est pas trop accepté
Mais tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Toi, les rois tu t'en fous c'est pas c'qui t'plaît
Mais tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Même si deux reines c'est pas trop accepté
Mais tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Toi, les rois tu t'en fous c'est pas c'qui t'plaît

Mais je pense qu'un jour elle acceptera
Qu'elle aussi elle t'aime un peu plus fort
Moi je crois aux histoires auxquelles les autres
Ne croient pas encore

Et tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Même si deux reines c'est pas trop accepté
Et tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Toi, les rois tu t'en fous c'est pas c'qui t'plaît
Et tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Même si deux reines c'est pas trop accepté
Mais tu voudrais qu'elle soit ta reine ce soir
Toi, les rois tu t'en fous c'est pas c'qui t'plaît

Angèle Van Laeken

<https://www.youtube.com/watch?v=KHr1snPlgMU>

Elaborado de produktaĵoj

Mia patrino ne estis kapabla solvi problemon sen unue ĝin dramigi. Same kiel matematikisto ne komprenas la realecon ĝis li formulas ĝin en ekvacion, ŝi ne komprenis hejman malfacilaĵon se ŝi ne transformis ĝin en katastrofon. Ni homaj estaĵoj estas strangaj ; ni bezonas prilabori krudan materion (ĉu terpomojn ĉu hidrargon) antaŭ ol fine ĝin uzadi. Ekzemple ne indas la oro, ĝis ni transformas ĝin en kolĉenon. Ni povus profiti ĝin tian kia ĝi troviĝas en la naturo. Sed ni bezonas ĝin ekstrakti el la malmola grundo, ĝin fandi, ĝin muldi kaj ĝin vendi. Tiam ni diras : « Nekredeble bela estas oro. »

La transformo de la sardinoj en sardelojn estas la pozitiva varianto de tiu inklino. La materio per kiu mia patrino konstruis siajn dramojn, estis la malgravaj malfacilaĵoj el la hejma ĉiutago. Okazis ke la botelego de gaso malplenis iun lundon, kaj ke la kamiono ne liveris ĝis la mardo. Unuavide, tio estis neniel tragika, des malpli ke al la infanoj plaĉis kruda manĝo. Cetere tio valoris ĉar rompiĝis la rutino. Sed ŝi nervoziĝis kaj iris ien-tien hurlante kriojn kiuj hirtigis siajn harojn. Se mia patro provis ŝin trankviligi, ŝi riproĉis al li ke li ne sufiĉe okupiĝis pri tiaj aferoj, kaj asertis ke ŝi estas la sklavo de ni ĉiuj, kaj ni rigardis ŝin tremante.

Post horduono dum kiu ni restis sen gaso, mia patro, senespera pro la riproĉoj kaj la krioj de mia patrino, komencis klak-fermi la pordojn aŭ minacis ke li saltos de la balkono. Mia fratineto, timigita pro la spektaklo, ekploris, kaj la najbaroj minacis alvoki la municipan policion se ne ĉesos la kriado. Ĝuste en tiu momento, kiam la etoso estis eksplodonta kun ĉiuj ni inkluzive, mia patrino trairis la straton revenante, triumfe ridetante, kun botelego kiun pruntedonis al ŝi ŝia fratino loĝanta en la aliflanka domo. Ne malofte ŝi riproĉis al mia patro ke li pensis pri memmortigo pro tia stultaĵo. « Mankas klapo en via kapo », ŝi diris al li, dum ŝi enbrake prenis mian fratineton por ke ŝi ne plu ploru. Mi aliris la straton diskrete, kun la intenco konverti tion okazintan en prilaboritan produkton, kaj por vidi ĉu tiel mi sukcesos kompreni ĝin. Sed nun mi daŭre ne komprenas. Fine, verki estas nenio krom preni la krudan materion de la realeco, kaj ĝin konverti en literaturon por estigi ĝin pli digestebla.

Elaboración de productos

Mi madre no era capaz de resolver un problema si no lo convertía previamente en un drama. Del mismo modo que el matemático no comprende la realidad hasta que la atrapa en una ecuación, ella no entendía una dificultad doméstica si no la transformaba en una catástrofe. Los seres humanos somos así de raros ; necesitamos elaborar las materias primas — sean patatas o mercurio — para darles en uso final. No entendemos el oro, por ejemplo, hasta que lo transformamos en un colgante. Podríamos disfrutar de él tal como se encuentra en la naturaleza, pero no. Necesitamos extraerlo de la dura tierra, fundirlo, moldearlo y ponerlo a la venta. Entonces decimos : « Fantástico. Qué bello es el oro. »

La transformación de las sardinias en sardinias en lata es la variante positiva de esta tendencia. La materia prima con la que mi madre construía sus dramas eran las pequeñas dificultades domésticas de cada día. Pongamos que se nos había acabado la bombona de gas un lunes y que el camión de reparto no pasaba hasta el martes. En principio, no era ninguna tragedia, porque a los niños nos encantaba comer de bocadillos. Incluso tenía su lado bueno porque rompíamos la rutina. Pero ella se mesaba los cabellos e iba de acá para allá profiriendo unos alaridos que nos ponían los pelos de punta. Si mi padre intentaba calmarla, le reprochaba que él no se ocupara de esas cosas y aseguraba que era la esclava de todos nosotros, que la contemplábamos estremecidos.

A la media hora de habernos quedado sin gas, mi padre, desesperado por los reproches y los gritos de mi madre, empezaba a dar portazos o amenazaba con tirarse por el balcón. Mi hermana pequeña, aterrada por el espectáculo, se ponía a llorar, y los vecinos amenazaban con llamar a la policía municipal si no cesaba el griterío. Justo en ese momento, cuando el universo iba a reventar con todos nosotros dentro, mi madre cruzaba la calle y al rato volvía sonriendo triunfalmente con una bombona que le había prestado su hermana, que vivía en la casa de enfrente. No era raro que le reprochara a mi padre que hubiera pensado en suicidarse por una tontería así. « Tú no estás bien de la cabeza », le decía, mientras cogía a mi hermana pequeña en brazos para que dejara de llorar. Yo me iba cabizbajo a la calle intentando convertir lo que había ocurrido en un producto envasado, para ver si de ese modo lograba comprenderlo. Pero todavía no lo comprendo, y eso que escribir no es más que tomar la materia prima de la realidad y convertirla en literatura para hacerla más digerible.

Juan José Millás (2008)

Galantoj

Du etaj galantoj nelge ekfloris ĉe mia elektronika mesaĝilo. Mi proe estis des pli mirigita ke mi malsciis, ĝis tiu tago, eĉ la ekziston mem de ties semintoj. La unua devenis de la sindikato CFE-CGC. Tiu ĉi plej energie protestas kontraŭ decido far la Franca Agentejo pri Disvolviĝo (AFD), publika institucio aganta nome de la ŝtato kiu, per iu « alvoko al projektoj », postulas de la francaj ofertantoj respondojn ekskluzive en la angla. « *La CFE-CGC denuncas tiun malstabiligan modon pri english only, kontraŭ-produktivan kaj malfortigan. Ĝi postulas ke uzado de lingvoj estu konsiderata kiel esenca elemento de la labor-kondiĉoj.* » Ĝi evidentigas la pli kaj pli grandan proporcion da kadroj devigataj regule uzi ne-denaskan lingvon, kio estas « *kroma handikapo por multnombraj salajritoj kiuj tiel troviĝas forigitaj de dungeblo.* ». Ne mi tion diras, sed sindikato de kadroj. Tute aliflanke, la dua galanto boris la neĝon ĉe la Poluso por Renaskiĝo de Komunismo en Francio (PRCF), kiu publikigas ĉe sia retejo, okaze de la sesa centjariĝo de Johanino d'Arko, neekspektitan alvokon — « (Un)happy birthday to you, miss Johanino d'Arko » — precipe dediĉitan al la problemo de la franca lingvo. Indas legi tiun longan tekston kiu efike demonstros kie troviĝas batal-linio : kiuj trudas al Francujo la « *ĉio-en-anglon de la estraro* », tiuj ĝin submetas al la Dia Merkato kaj al la eŭropatutmonda kapitalismo. « *Urgas ke ĉiuj rezistantoj al la novliberala oĝro ĉesu superrigardi la lingvan batalon* », diras tiu alvoko. Ĝi skizas perspektivojn de pripenso ne malpli interesajn pri la regionaj kaj promigraj lingvoj, kiujn oni ne (aŭ ne plu) oponigu al la institucia franca lingvo. La ĉio-en-anglan medion fakte rekomendas tiuj samaj estraranoj kiuj afektas kredon ke « *la nacia identeco estus minacata de la senegala ter-fosisto aŭ de la franclingva islama kelnerino* ». Intence mi kunprezentas tiujn du alarmojn tiel malsamajn. Oni fakte malfacile konvinkos min, ke ekzistas komploto social-ŝovinisma kuniganta sindikaton de kadroj kun marksisma-leninisma movado. Kiuj ajn estas iliaj respektivaj ideologioj aŭ sociaj situacioj, ŝajnas al mi ke tiuj perceptis realan problemon. Mi estas sincere kontenta ke tiuj iniciatoj venas de ili.

Perce-neige

Deux petits perce-neige ont récemment éclos sur ma messagerie électronique. J'en ai été d'autant plus émerveillé que j'ignorais, à ce jour, jusqu'à l'existence même de ceux qui les ont semés. Le premier émane du syndicat CFE-CGC. Celui-ci proteste avec la dernière vigueur, contre une décision de l'Agence Française de Développement (AFD), établissement public agissant pour le compte de l'état, qui, dans un « appel à projets », exige de la part des soumissionnaires français des réponses exclusivement en anglais. « *La CFE-CGC s'insurge contre cette mode déstabilisante de l'english only, contre-productive et affaiblissante. Elle demande que la pratique des langues soit considérée comme un élément essentiel des conditions de travail.* » Elle souligne la proportion sans cesse croissante de cadres qui se voient contraints d'utiliser régulièrement une langue non maternelle, « *handicap supplémentaire pour de nombreux salariés qui se trouvent ainsi éloignés de l'emploi* ». Ce n'est pas moi qui le dis, c'est un syndicat de cadres. Très loin de là, le second perce-neige émane, lui, du Pôle de Renaissance Communiste (PRCF) qui publie sur son site, à l'occasion du sixième centenaire de Jeanne d'Arc, un étonnant appel — « (Un)happy birthday to you, miss Jeanne d'Arc » — principalement consacré à la question de la langue française. Il faut lire ce long texte qui démontre de façon éclatante où est la ligne de front : ceux qui veulent plier la France au « *tout anglais patronal* » sont ceux qui veulent la soumettre au Divin Marché et au capital euromondialisé. « *Il est urgent que tous les résistants à l'ogre néolibéral cessent de regarder de haut le combat linguistique* », dit cet appel. Il offre des perspectives de réflexion non moins intéressantes sur les langues régionales et immigrées, qu'il ne s'agit pas (ou plus) d'opposer au français constitutionnel. Le tout anglais est en effet prôné par les mêmes dirigeants qui feignent de croire « *l'identité nationale menacée par le terrassier sénégalais ou par la serveuse musulmane francophone* ». C'est à dessein que je rapproche ces deux alertes si différentes. On aura du mal à me convaincre, en effet, qu'il existerait un complot social-chauvin unissant un syndicat de cadres avec un mouvement marxiste-léniniste. Quelle que soit leur idéologie ou leur situation sociale, il me semble que ces gens ont perçu un problème réel. Je suis positivement ravi que cela vienne d'eux.

François Taillandier (l'Humanité / jeudi 12 janvier 2012)

Instrui globiŝe

Defendante sian leĝ-projekton (validigitan la 20^{an} de marto en ministrara Konsilio), kiu konsiderinde etendas la eblecon instrui en la angla ĉe francaj universitatoj kaj altgradaj lernejoj, S-ino Fioraso, reg-ministro pri instruado, tiel argumentis : ju pli ni allogos fremdajn studentojn, des pli ni utilos ... al la franclingvio ! Honeste, mi ĉion bonvolas aŭdi, sed mi tamen malfacile kredas ke mia aŭtomobilo pli bone funkcios post formeto de la baterio.

Ĉesigu vian pompan paroladon, S-ino ministrino. Ni simple vin pridemandu, pri preciza kaj provebla punkto, kiu neniel rilatas al iu ajn anglofobio. Ni imagu kurson pri juro, pri filozofio, pri sociologio, pri matematiko, instruata en la angla de franca profesoro al diversnaciaj studentoj. Ni povas konjekti ke la personoj kiuj konsistigas la grupon, ĉu studentoj ĉu instruistoj, estas neegale kompetentaj pri la angla : akcepteble por iuj, meznivele por aliaj, foje nesufiĉe. Tio instruita, tio prezentita, trans-sciigita kaj komprenita, estos tio komprenebla de ĉiuj. Alidirite : speco de komuna minimumo. Ĉu eblas imagi ke la kursa materio, la komplekseco, la nuancoj plu restos sendifektaj ? Ĉu la personeco de la instruisto mem, ties persona talento kaj, ni eĉ aŭdacu paroli pri ties eventuala karismo, ne estos stompita de la neceso paroli en lingvo ne sia — kun la kroma sento ne esti komprenata ?

Tiel, pro abstrakta percepto de la instruado, ŝirme sub pompaj teknokrataj vortoj ("*disradiigo*", "*allogivo*", "*efikeco*"), oni forgesas la kernan esencon de iu ajn instruado : la intiman konon, la profundan reciprokon, la alproprigon de sciaĵaro far iu menso. Oni vicigos belajn procentojn de fremdaj studentoj, belajn internaciajn gradojn de niaj universitatoj kaj de niaj lernejoj, sed ni simple forgesos kion lerni signifas.

Cetere : tiu decido fare de maldekstruloj certe ne levos viglajn protestojn el la liberala dekstrularo, kiu ja elmontris, dum la jarkvino de Sarkozy, kion ĝi kapablas tiukampe. Neniu sin demandas kial, pri iuj temoj, dekstruloj kaj maldekstruloj mirakle akordas sen antaŭa diskuto.

Enseigner en globish

En défense de son projet de loi (validé le 20 mars en Conseil des ministres), qui étend considérablement la possibilité de dispenser un enseignement en anglais dans les universités et grandes écoles françaises, Mme Fioraso, ministre de tutelle, a émis l'argument suivant : en attirant ainsi un plus grand nombre d'étudiants étrangers, nous servirons ... la francophonie ! Franchement, je veux bien tout entendre, mais j'ai quand même du mal à croire que ma voiture marchera beaucoup mieux une fois qu'on aura retiré la batterie.

Trève de grands mots, Mme la ministre. On peut ici poser une question simple, portant sur un point précis et démontrable, qui n'a rien à voir avec une quelconque anglophobie. Supposons un cours de droit, de philosophie, de sciences sociales, de mathématiques, dispensé en anglais à des étudiants de diverses nationalités. On peut supposer que les personnes composant le groupe, élèves comme enseignants, ont une maîtrise inégale de l'anglais : convenable pour les uns, moyenne pour d'autres, insuffisante parfois. Ce qui "passera", ce qui sera exposé, transmis et acquis, sera ce qui peut être compris par tous. En d'autres termes : une sorte de plus petit dénominateur commun. Peut-on imaginer que le contenu des cours, les complexités, les nuances, en ressortiront intacts ? La personnalité même de l'enseignant, son talent personnel et, osons le mot, son charisme (s'il en a), ne seront-ils pas rabotés par la contrainte de parler dans une langue qui n'est pas la sienne — ou le sentiment d'être mal compris ?

C'est ainsi qu'en fonction d'une vision abstraite de l'enseignement, abritée derrière de grands mots ("*rayonnement*", "*attractivité*", "*efficacité*"), on perd de vue ce qui est le noyau atomique de tout enseignement : la connaissance intime, la rencontre profonde, l'appropriation d'un savoir par un esprit. On alignera de beaux pourcentages d'étudiants étrangers, de beaux classements internationaux de nos facs et de nos écoles en ayant tout simplement oublié ce qu'apprendre veut dire.

Un dernier mot : cette mesure portée par la gauche ne suscitera certainement pas une opposition bien vive dans la droite libérale, qui a assez montré, durant l'ère Sarkozy, de quoi elle était capable en ce domaine. Personne ne se demande comment il se fait que, sur certains sujets, comme ça, droite et gauche soient d'accord sans en avoir jamais parlé.

Kial tia malamo kontraŭ Charles Enderlin ?

Raporto far la israela registaro pri la morto en 2000 de la knabeto Mohammad naskas multnombrajn reagojn.

Kiun nivelon atingos la obstineco kontraŭ Charles Enderlin, la ĵurnalisto de France2 kiu laboras en Jerusalemo ? Dimanĉon, la israela registaro publikigis raporton, pli ol dek du jarojn post la okazaĵo, kiu malresponsigas la israelan armeon pri la pafmorto de la knabeto Mohammad Al Doura en la brakoj de lia patro, la 30^{an} de septembro 2000^a. Filmite apud Gazao dum alfrontoj inter Palestinanoj kaj Israelanoj, la bildoj tiam cirkulis tra la mondo. La raporto relanĉas la tezon pri trompo fare de la ĵurnalisto kaj de France Télévisions. Kurioze, ĝia publikigo intervenas ĝuste kiam la apelacia kortumo de Parizo devas juĝi pri la plendo de Charles Enderlin pro malfamigo kontraŭ Philippe Karsenty, direktoro de studejo pri amasmedioj kaj vic-urbestro de Neuilly-sur-Seine, ĝuste tiu kiu lin akuzas pri trompo. London, la patro de la palestina infano rekonfirmis al la agentejo AFP ke li *"estas preta akcepti ke internacia enket-komisiono kun Araboj malfermos la tombon kaj analizos la kadavron kaj la kuglojn kiuj trakorpigis lian filon"*. La israela ĉef-ministro, Benyamin Netanyahu siaflanke bonvenigis la raporton, pravigante sian decidon ĝin mendi en septembro, do dek du jarojn post la faktoj, pretekste ke *"la tezo diskonigita de la ĵurnalisto inspiris kaj pravigis la terorismon, la antisemitismon kaj la mallegitimon de Israelo"*. Multnombraj voĉoj protestas kontraŭ la publikigo de tiu raporto. Deputito de la partio Kadima (centra-dekstra), Israël Hasson, eksa vic-ĉefo de la sekcio pri interna sekureco ĝin taksas *"entuta absurdaĵo neprofesia kaj nekongrua"*. La ĉiutaga ĵurnalo Haaretz (maldekstra) asertas ke tiu raporto estas *"unu el la malplej oportunaj dokumentoj skribitaj de la israela registaro en la lastaj jaroj"*, ĉar *"imagi ke tia raporto povos ŝanĝi tutmonde akceptatan version, dek tri jarojn poste, signifas provi remeton de dento-pasto en la tubon"*. *"Ŝajnas ke la raporto estis skribita por esti uzata en Israelo. La prezentitaj pruvoj kaj argumentoj povas konvinki tiujn jam konvinkitajn, sed ne pli"*, li rimarkas, konjektante ke temas pri *"venĝo de la Israela Ŝtato kontraŭ ununura ĵurnalisto de France2, Charles Enderlin"*. *"La damaĝoj kaŭzitaj de la raporto povus superi ĝian dubindan utilecon"*, avertas Haaretz. *"Se la tutmonda gazetaro enkalkulas la raporton, tio povus reaktualigi la debaton pri la palestinaj infanoj, viktimoj dum operacoj de la israela armeo"*. Laŭ la NRO Defence for Children International, kiu listigas la palestinajn infanojn mortigitajn pro ĉeesto de militistoj aŭ de israelaj koloniistoj de la komenco de la dua Intifada, 728 tiel pereis inter 2000 kaj 2005. Sen rilato*.

* : en la franca "rapport" signifas kaj "raporto" kaj "rilato".

Pourquoi une telle haine contre Charles Enderlin ?

Un rapport du gouvernement israéliens sur la mort en 2000 du petit Mohammad suscite de nombreuses réactions.

Jusqu'où ira cet acharnement contre Charles Enderlin, le journaliste de France 2 en poste à Jérusalem ? Dimanche, le gouvernement israélien a rendu public un rapport, plus de douze ans après les faits, qui exonère l'armée israélienne de la responsabilité du décès sous les balles dans les bras de son père, le 30 septembre 2000, du petit Mohammad Al Doura. Tournées près de Gaza lors d'affrontements entre Palestiniens et Israéliens, les images ont fait le tour du monde. Le rapport relance la thèse d'une manipulation du journaliste, auteur du reportage, et de France Télévisions. Curieusement, sa publication intervient alors qu'aujourd'hui la cour d'appel de Paris doit se prononcer sur la plainte en diffamation de Charles Enderlin contre Philippe Karsenty, directeur d'un site d'analyse des médias et maire adjoint à la mairie de Neuilly-sur-Seine, celui-là même qui depuis douze ans l'accuse de trucage. Le père de l'enfant palestinien, Jamal Al Doura, a réaffirmé lundi à l'AFP à Gaza être *"prêt à une commission d'enquête internationale comprenant des Arabes pour ouvrir la tombe et analyser le cadavre et les balles qui ont traversé le corps de Mohammad"*. Le premier ministre israélien, Benyamin Netanyahu, a, lui, salué le rapport, justifiant sa décision de le commanditer en septembre, soit douze ans après les faits, au motif que *"la version répandue par le reportage a servi d'inspiration et de justification au terrorisme, à l'antisémitisme et à la délégitimation d'Israël"*. De nombreuses voix s'élèvent contre la publication de ce rapport. Un député du parti Kadima (centre droit), Israël Hasson, ex-adjoint du service de sécurité intérieure, y voit *"une absurdité totalement non professionnelle et à côté de la plaque"*. Le quotidien Haaretz (gauche) juge ce rapport comme *"l'un des documents les moins pertinents écrits par le gouvernement israélien ces dernières années"*, estimant que *"s'imaginer qu'un tel*

rapport parvienne à changer la version mondialement acceptée, au bout de treize ans, revient à essayer de remettre le dentifrice dans le tube". "Le rapport donne l'impression d'avoir été écrit pour être utilisé en Israël. Les preuves et les arguments présentés peuvent convaincre ceux qui sont déjà convaincus, mais pas davantage", remarque-t-il, y discernant "une vengeance de l'Etat d'Israël contre un seul journaliste de France 2, Charles Enderlin". "Les dégâts causés par ce rapport pourraient être plus grands que son utilité douteuse, prévient Haaretz. Si la presse internationale reprend le rapport, cela pourrait rouvrir le débat sur les enfants palestiniens touchés pendant les opérations de l'armée israélienne." Pour l'ONG Defence for Children International, qui recense les enfants palestiniens tués en raison de la présence de militaires ou de colons israéliens depuis le début de la deuxième Intifada, 728 ont péri ainsi entre 2000 et 2005. Sans rapport.

Claude Baudry (l'Humanité / jeudi 22 mai 2013)



AFP

Le jeune Mohammad Al Doura a été tué par l'armée israélienne près de Gaza.

La keglo-ludo

En matena flavo, frua trankvilo,
el minareto, preĝ-voko muezina,
lante sur la strata malurĝo
hom-amaso de Gazao okupata
tra varmo ŝveba al l' taga rutino,
kvieta vagadas al bazara svarmo
fide-defie, kvazaŭ ĉielo lazura
kvazaŭ fabelo pri egido alaha,
pri paca najbaro, pri saĝo usona,
pri UNO patrona por ŝtat-agnosko.

Kaj aroga ĵipo ses tubojn minaca,
bremsas jore, kriĉe-spute polvas nube,
jam teruron magnetas ellase,
ĉe fruntoj ŝvitas perle l' fato alvena,
kaj la tuboj ekkraĉas blinde
hazarde draŝas, kuglo keglen,
disseme morton sur l' arida grundo
fajras timon tra l' aera denso
celume al la discela forfuĝo,
memsavo sakstrata, alhejmo rifuĝa.


Ĉie teruro trampas pretere
diŝutante kuglaron pafade,
kaj siblas zome kaj zumas fulme
rabe aglas, falĉe selektas morten
laŭ ĉi trajektorio cel-arbitra,
iala samplo viktima de l' tago,
sed alrektas al ĉi knaba plorado
tegita en brakoj de sia patro
kiu volvas sperte-sene, vicpatrine,
laŭeble ŝirmas en vana protekto.

Tiam la soldato levas la tubon
de la predo taksas la trafon
je morto-ludo plusas poentojn ;
tiuj konten aldoniĝas venke-glore,
kaj la tubo pafadas denove
ignore la patran voko-krion
senzorge pri la knaba silento,
pri l' obtuza registara protesto
pro tutmonda la malaprobo,
kolera vortpafado de ĉi teksto.

Tra la seruro de l' scivolo monda
fivenko de selekto metodika
fluadas sango laŭ media ondo
elspekte tra l' okula katodiko.
El ĉi milita partituro ŝtatara,
l' orkestron usonas la muzikestro,
melodio stabe kriĉas fuŝaritmec,
moneroj tintas, biletoj kraketas.
Sed kiu perdolaras la refrenon ?
Rezignacie trisimie vole-nevole :
ni ĉiuj.

*Vi kuglo ne kulpas, vin ellasis la soldato
Obeas soldato, lin komandis superulo
L' supero decidis, laŭplane regas la stabo
Pri la staba plano plu restas neniu spuro*

Liro 2006 (laŭda mencio)



Ek al l' laboraĉo,

Ek al l'senfina laboraĉo,
tamen ne tro multe laciga
dank' al mia dolĉa kuseno
tiom mola kiom sonĝiga.

Se la dormado tro profundas
sonoras laŭta vekhorloĝo
tiel neniam mi maltrafas
l' akuratan finon de l' tago.

Ĉar same kiel ĉiuj scias
el ĉiuj vivantoj de l' mondo
la plej sonĝema, kato estas
tial partigendas l' kuseno.

Cetere, pri kio sonĝas mi ?
miaj pensoj ŝvebas al mondo
kie ne endas laboradi
sen trudo, strebo nek devigo.

Noto : kompreneble iu informis min nur poste ke vorto-finaĵoj identaj tute ne estas trafa kriterio por validigi rimojn en Esperanto. Estu indulgaj do.

En ĉambro por kaf-paŭzoj apuda de mia tiama oficejo, ofte amasiĝis nelavitaj trinkiloj. Nur malgranda minoritato, ĉiam la samaj, regule lavis ĉu pro naŭz-ĝeno ĉu simple pro principa higienemo. Jen kion mi spite afiŝis super l' amaso (kompreneble ĉi-okaze la unua versio franclingvis) :

Réunies dans cette glu saccharose-caféine
Les tasses à café, leurs amies les cuillères
En un rêve utopique instamment imaginent
L'assistance salvatrice d'une main ménagère

Kunkune en kaĉo kafein-sukera
Kuleretoj, ties amikoj la tasoj
Laŭ rev' utopia, iluzi' ĥimera
Imagas lavadon de l' vazaj amasoj